5-a Jaro. N-o 210 APERAS  SEMAJNE 11. Oktobro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

Al la direkto de morgaŭa ruĝo

Kiam mi estis infano, mi ofte dumsomere kuŝis ĉe la hejma kabano sur herbo kaj rigardadis supren. Mi rigardis serene naĝantajn sunajn nubojn sur la bluaĵo de l' ĉielo. Mi rigardadis kaj miris pri diversaj fantaziaj formoj iliaj. Unu ŝajnis esti kiel la giganto en unu fabelo, kiun mi kun ega intereso legis. Iu alia tre similis grandan kastelon, kiu havis arĝentajn arkojn kaj turojn. Dum mi ilin rigardis, mia koro pleniĝis je stranga sopiro. Mi sopiris tien supren al la nuboj. Mi volis naĝi sur la nuboj kaj nubetoj al fremdaj kaj malproksimaj landoj. Mi ĵaluzis birdojn, kiuj flugadis sur la ĉiela lazuro. Precipe mia ĵaluzo estis granda kontraŭ la birdoj, kiuj, kiel mi legis, transflugas al aliaj kontinentoj, al la sunaj kaj varmaj.

Mi sopiris ankaŭ varmecon, ĉar mi estas infano de l' frosta nordo. Mi rigardadis kun sopiro kaj miro la orkoloran horizontlinion dum malleviĝo de la suno, kiu malaperis malantaŭ arbaroj ĉe la rando de l' horizonto. Ĝi ŝajnis transiri al iu alia, al mi tute nekonata mondo. Mi konstruis ideojn kaj opiniojn pri la mirindaĵoj kaj al mi nekompreneblaĵo de l' mondo. Mi konstruis en mia cerbo “aerajn kabanojn“ kaj “nubajn kastelojn“. Mi nature dum infaneco ne komprenis kaj ankaŭ ne sciis pri vera ĉies manko kaj mizero. Pro tio miaj revaj kasteloj estis belaj, kaj mi mem estis en ili kiel fabela princo.

Sed... En ĉiuj rakontoj eĉ belaj kvazaŭ devige troviĝas ankaŭ alia flanko, kiu kutime komenciĝas per la vorto: Sed. Tiel okazis ankaŭ nun al mi. Miaj revoj plej altaj estis devigataj mallevi sin sur la teron. Mi komencis senti, ke mi estas katenita al tero. Mi komprenis jam reale, ke mi ne havas la eblecon sekvi flugon de la birdoj kaj naĝadon de la nubetoj. Mi estis ligita surtere, kaj mi iom post iom ligiĝis kun l a b o r o.

Mi kredas, ke tia estas idearo de multaj infanoj proletaj kaj ankaŭ burĝaj. Sed la aerkonstruoj de l' proletidoj disrompiĝas jam frue kiel sapvezikoj. Tiel okazas ankaŭ al multaj intelektaj proletidoj. Tro frue intermiksiĝas fiherbaĵo en fruktpromesantan grenon de l' mensa kampo proletcerba. Tro frue tre ofte sufokiĝas juna alten celanta intelekto. La elasteco de la juna spirito elŝvitas foren dum malmola laboro senpensa. Kaj tre ofte promesplena junulo aŭ junulino fariĝas nura instrumento porlabora. En tiu ĉi socio la vojo de l' vivo por proleto estas tre plena je malhelpoj, eĉ la tuta vivo aspektas kiel unu sola batalo, unu sola kaj senfina mizero. Tie preskaŭ ĉiam laciĝas la penso, kie laciĝas la korpo. Inter nia aro ekzistus multe pli da intelektuloj, multe pli da viroj kaj virinoj, kiuj per siaj agoj kaj verkoj estus ege bonefikantaj por utilo de l' tuta homaro, se nur malmulte almenaŭ estus antaŭ ili ebenigita la vojo irota. Sed ĉio ja dependas de l' monsako. La bezonatan ekzercon de l' intelekto oni devas aĉeti per mono, kaj proleto ricevas monon nur por manĝi, kaj manĝaĵo kostas prezon de l' tuta vivo. Do, tie nenio restas esperebla. Nur laboru, por ke vi kaj la viaj ne mortu pro malsato!

Estas ja vere, ke inter ni troviĝas multaj eminentuloj, rekte el inter ni leviĝantaj, kreskintaj pli alten ol ni ceteraj. Sed ili eble havis fortegan naturon kaj eventuale ian “ŝancon“. Tamen rigardante la aspekton de l' aferoj ĝenerale, ni devige alvenas al la jam priskribita konvinko. Kaj ŝajnas pro tio, ke mia artikolo devas finiĝi tro malĝoje, kaj ni jam plenkreskaj homoj ŝajnas esti devigataj pensi pri pli belaj eventualaj tempoj kiel pri iaj duminfanecaj nubaj kasteloj, kaj rigardi sur la rando de l' ĉielo sopirege la ruĝiĝon de la nuboj.

Sed ni ne atendu, ke iu alia ol ni mem al ni ebenigos la vojon. Ni ne rigardu al la direkto, kie malleviĝanta suno kolorigas la ĉielon. Ni rigardu tien, kie flamas ruĝo de l' m o r g a ŭ o, kaj ni mem severege gardu ke nunaj nubaj kasteloj niaj fariĝu efektivaj kaj ke ne la juneco de niaj idoj estu sapveziko, kiu tro frue rompiĝas pro uraganoj sur la maro de l' vivo.

V o j a ĝ e m u l o.

La mondoj mortas, ĉar ili naskiĝas. Senĉese iuj naskiĝas, aliuj mortas. Kaj la kreado, ĉiam nefinita, persiste daŭras en senĉesaj transformiĝoj. La steloj estingiĝas, dum ni ne povas diri, ĉu tiuj filinoj de lumo, tiel mortante, ne komencas, kiel planedoj, alian ekzistadon fruktodonan, kaj ĉu la planedoj mem ne disvolviĝas por resteliĝi. Nur ni scias, ke la senmoveco ne ekzistas en la ĉielaj spacoj, same kiel sur la tero, kaj ke la labor-penleĝo regas super la multego da mondoj.

Anatol Frans (en “Ĝardeno de Epikuro“).

VOJAĜAJ IMPRESOJ EL SUDA AMERIKO[1]

V

Panamo

La giganta entrepreno de elfosado de l' kanalo, kiu kunligas la atlantikan kaj pacifikan oceanojn, finpretigita de Usono en 1914, estas sufiĉe bone konata. Tial mi nur mallonge priskribas la trairadon kaj preferas utiligi la okazon por pritrakti novan kanalprojekton tra Nikaragvo, kiu nuntempe estas kunligita kun tre aktuala grandpolitika temo. —

En la vasta haveno de Kolon (hispane: Colon), sur orienta bordo de Panamo, multaj ŝipoj atendis la vicojn por trairi la kluzojn. Post zorga ekzamenado de kuracisto, ĉu regis sanstato sur nia ŝipo, alvenis kanalpiloto kaj dek negraj laboruloj. Dum ĉ. ½-a horo ses elektraj lokomotivoj tiris nian ŝipon tra kvin kluzpordoj kaj levis ĝin 28 metrojn al la artefarita lago de Gatun. La lago kaj la kanalo havas longecon de ĉ. 80 km., kaj tutan tagon ni bezonis por atingi la okcidentan bordon.

La negraj oficistoj laboris nur dum trapasado de l' kluzoj ĉ. unu horon. La ceteran tempon ili kartludis. Por ĉi tiu laboro ili ricevis salajron de 5 dolaroj kaj bonegan manĝon sur la ŝipo. Tiuj ĉi laboristoj verŝajne havas la plej malaltan salajron de l' kanaloficistoj.

La urbo Panamo aspektis sufiĉe bela. Sur la zorge pavimitaj stratoj regis vigla trafiko. Oni tie povas vidi homojn el ĉiuj mondpartoj, de ĉiuj koloroj kaj homgentoj. La blankulaj kanaloficistoj loĝas en aparta luksa urbparto Balboa. Laŭlonge de la larĝaj stratoj estas longaj vicoj da belegaj kokospalmoj, kies fruktoj pendis maturaj super ni.

En alia aparta loko ekster la urbo estas multaj kazernoj por kelkmil soldatoj. Mi foje vizitis soldatan hejmon. Granda halo kun skribtabloj, libraro, fortepiano kaj restoracio je malalta prezo. Ekster la domo banejo, baseno kun muroj kaj fundo el blanka marmoro je senpaga dispono por la gastoj. La soldatoj bele vestitaj aspektis kiel veraj “sinjoroj“.

Iutage mi faris longan ekskurson kaj renkontis hazarde danan farmiston, kun kiu mi facile povis interparoli, ĉar mi scias la danan lingvon. Je mia peto rakonti pri siaj travivaĵoj, li donis jenan raporton:

Antaŭ dektri jaroj mi kune kun 40 danaj senlaboruloj elmigris al Nikaragvo, kie ni akiris terpartojn por kulturi je favoraj kondiĉoj. Sed post nelonge ni konstatis, ke ni estis venintaj en veran inferon. Malario, flava febro kaj aliaj teruraj malsanoj faris riĉan rikolton inter ni. Krome de tempo al tempo vizitis nin bandoj de rabistoj detruante kaj rabante nian kun granda penado akiritan posedaĵon, tri fojojn eĉ mortigante kamaradojn, kiuj volis sin defendi. Tial mi post kvarjara restado en Nikaragvo forkuris sen havaĵo al Panamo, kie mi kun helpo de afablaj homoj akiris senpagan bienon.

Je mia demando pri la nova kanalprojekto tra Nikaragvo li respondis: Jam de kelkaj jaroj Usono faris kontrakton kun la respondeca registaro de Nikaragvo pri kanalzono tra la lando kaj pagis tre altan sumon. Usono estis jam preparinta la antaŭlaborojn, kiam subite aperis sur la scenejo bandoj de rabistoj, kiuj embuske atakis usonajn entreprenojn, mortigante oficistojn kaj laboristojn, bruligante kaj detruante usonajn fondaĵojn. Nun Usono ekagis. Baldaŭ aperis sur la tero de Nikaragvo taĉmentoj de usonaj soldatoj. La gvidanto de l' rabistaj bandoj, generalo Sandino, mem rabisto, nun trovis bonan okazon por sin prezenti kiel nacia defendanto. En Anglio kaj Francio la gazetaroj, eĉ laboristaj organoj, nomis lin nacia heroo. Tio estas bone komprenebla, ĉar Sandino estas subaĉetata de Anglio, kiu mem volas fari kontrakton por elfosi la kanalon.

Anglio ja celas kontroli ĉiun ĉefan akvovojon, kaj ĝi estas tre envia pro tio ke Usono kontrolas la Panamo-kanalon. Oni memoru, kiel ruze Anglio agis akirinte la superregadon de l' Sues-kanalo. Je mia demando, kial Usono preskaŭ ĉiutage okazigas militmanovrojn en la kanalzono, la dano respondis: Usono bonege konas la intencojn de siaj “amikoj“, kaj se Usono ne montrus siajn akrajn dentojn, tutcerte baldaŭ aperus iu generalrabisto Sandino ankaŭ en Panamo. Pro la ĉiam kreskanta martrafiko la kanalo de Panamo estas tro ŝarĝata. Estas necesege konstrui novan plej eble baldaŭ kaj la plej konvena loko estas en Nikaragvo.

Usono havas sperton kaj monon por fari la gigantan laboron. Ĝi ankaŭ havas rimedojn por ekstermi la mortmalsanojn de Meza Ameriko; krome Usono pagas la plej altan salajron al siaj laboruloj. Iu usona grandfinancisto ĵus diris: La kaŭzon de l' bonega ekonomia pozicio de Usono ni devas trovi en alte pagata kaj bone zorgata laborularo. Mi citas tiun diron, ĉar ĝi estas vera. Estas utile kompari, kiel Anglio pagas kaj zorgas siajn laborulojn. Ni devas konstati, ke tie milionoj vivas en plej granda mizero.

Ni laboristoj de la mondo devus postuli, ke la ĉefaj akvovojoj apartenu al la tuta homaro, same kiel la maroj. Almenaŭ ni ne metu nin ĉe la flanko de fipatriotaj rabistoj, kiuj volas malhelpi entreprenon gravegan por la tuta homaro[2].

Muri (102).

[1] Vidu n-ojn 190, 191, 193, 194.

[2] En jul. n-o de la burĝa esp. gaz. “Hispana Esperanto“ ankaŭ aperis artik. pri Nikaragvo, kiu flame defendas la landeton kaj atakas la usonan registaron. — Red.

Raportoj

prezentitaj al la 1-a SAT-konferenco en Göteborg[1]

1. The Teachers' Labour League (T. L. L.)

(Instruista Labor-Ligo)

Raportanto: H. Stay (2978)

La Instruista Labor-Ligo fondiĝis en Londono komence de 1923. Depost tiam la Ligo okazigas ĉiujare Konferencon ĉe Kristnasko, kaj de malgranda ĝi kreskis ĝis nacia organizo, kies gravveco ĉiam pligrandiĝas. Dum kelka tempo la agado de la Ligo limiĝis en la metropola regiono. Fine de 1925, ĝi jam akiris firman bazon en landparto Lankaŝir (angle: Lancashire), kaj nuntempe ĝi havas 22 filiojn lokitajn tra la lando. Tamen, estas malfeliĉa vero ke rapida kreskado estas neebla pro multekosteco de la organiza laboro, kaj ankoraŭ kelkaj partoj de la lando ne estas influitaj.

Laŭ ĝia statuto, la celo de la Ligo estas, ebligi al geinstruistoj sin envicigi kun aliaj laboristoj en la lukto por anstataŭigi la kapitalisman ŝtaton per Socialista Komunumo. La metodoj uzataj por efektivigi tion estas: a) Kunlaboradi politike kun aliaj gelaboristoj, loke, nacie kaj internacie. b) Klopodi 1. por unuecigo de jam ekzistantaj organizoj de geinstruistoj en unu solan sindikaton de kleriglaboristoj en tiu ĉi lando, filiigotan al la Sindikatara Kongreso (T. U. C.) kaj al la Laborpartio; 2. por internacie organizi la geinstruistaron. c) Disvolvi la principojn kaj prepari la strukturon de la edukada sistemo estonta. d) Atentigi la publikon pri tiuj kondiĉoj en la hejmoj, lernejoj kaj alie, kiuj kondukas al la nuna malŝparado de edukada penado. e) Akiri kaj protekti plenajn civilajn kaj politikajn rajton por ĉiuj edukistaj kaj aliaj laboristoj. f) Klopodi por forigi imperialisman instruadon en la klerigaj institucioj de tiu ĉi lando.

En dec. 1925, ĉe sia Konferenco, la Ligo decidis filiiĝi kun la Internacio de l' Instrulaboristoj (Parizo), kaj tio instigis konservativulan deputiton interpelacii, en la parlamentejo, la Ministron por Edukado pri Eduk-Intern. Depost tiam la internacia laboro de la Ligo

[1] Komp. n-on 206, pĝ. 409.

estas intense kaj grandskale plenumata. La Ligo nun havas kontakton kun multaj organizoj instruistaj en la Brita Imperio, Usono kaj aliaj anglalingvaj landoj kaj ankaŭ konservadis konstantan interrilaton kun la Internacio de l' Instrulaboristoj. Tiu ĉi flanko de la laboro de l' Ligo estas rimarkinda pro la intereso, kiun ĝi vekas, kaj pro la koraj kaj utilaj respondoj, kiujn ĝi elvokas en tutmondo.

Dum 1926, la Ligo entreprenis du gravajn taskojn sur la internacia kampo. La unua estis la organizo — pere de Eduk-Intern. — de du delegitaroj de Britiaj instruistoj al Sovetio (Leningrado kaj Moskvo) en monatoj julio kaj aŭgusto. Entute 16 liganoj partoprenis. La dua estis la sendo de 8 membroj de la Ekzekutivo kiel delegitaro al la Konferenco de Eduk-Intern. en Vieno. La delegitaro faris la jenajn konkludojn, kiuj poste estis konfirmataj de la Ekzekutiva Komitato: 1. ke la Ligo ludadas gravan rolon en la Internacio; 2. ke la aliĝo de la Ligo al la Internacio estas reciproke valora al ambaŭ organizoj.

Sesmebra delegitaro de la Ligo ankaŭ vizitis la "Pedagogiajn Tagojn" de Eduk-Intern. en Leipzig dum la nuna jaro. Ĉe la 6-a Konferenco de la Ligo, kiu okazis fine de dec. 1927, esperanto estas akceptita kiel korespondlingvo. Oni decidis komenci propagandon por antaŭenigo de esperanto kaj interrilatiĝi kun esperantistaj laboristaj organizoj. Du aliaj rezolucioj kiuj estas akceptitaj dum la sama konferenco, tekstas jene: 1. Alvoki la membraron instigi geinstruistojn postuli pliampleksigon de la nuna interŝanĝa sistemo de instruistoj tiel ke vere internacia sistemo de interŝanĝo efektiviĝu. 2. Komisii la Nacian Ekz. Komitaton intertrakti kun Eduk-Intern. kun la celo prepari planon por liveri faciligojn por alilanda vojaĝado de instruistoj.

Dum la ĝenerala strikego de 1926, la penado de la filioj kaj individuaj membroj de la Ligo por helpi la ministojn nature efikis sur la efektivigon de multe da projektita laboro. Aldone al monkolektado, multe da valora laboro estas farita de la membraro, instigante por helpo al la ministoj fortojn kaj organizojn pli grandajn kaj vastajn ol tiuj de la Ligo mem. Tamen, en nov. de la sama jaro aperis la unua n-o de "The Educational Worker" (La Klerig-laboristo), monata oficiala organo de la Ligo. De tiam ĝi regule eldoniĝis, kaj nun ĝi estas unu el la plej potencaj bataliloj de la Ligo kaj kapablas fariĝi, politike kaj klerige, atentinda eldonaĵo.

Iom pri la kooperativa movado en Svedio

(Daŭrigo)

La industrio de K. F.

De tempo al tempo la asocio devis forte batali kontraŭ la trustoj kaj karteloj. La unua produktado, al kiu la asocio dediĉis sin, estas la margarino. Kelkajn jarojn antaŭ la milito la kartelo de margarino en Svedio bojkotis la asocion, celante per tio pereigi la kooperativan movadon. Oni malsukcesis. La asocio estis jam tro forta. Sed ĉar la kooperativa asocio estis dependa de la kartelo — ili devis aĉeti ilian margarinon — la asocio decidis mem starigi fabrikon por margarina produktado. Tiu fabriko estis konstruata en 1921. La longa margarina milito finiĝis tiam per la pereigo de la kartela potenco, kiu nun devis submetiĝi al la prezoj de K. F. La margarina fabriko estas la plej moderna en la tuta lando, kaj la margarino de K. F. superas ankaŭ kvalite la aliajn margarinojn. Jam post du jaroj oni devis pligrandigi la fabrikon de K. F., ĉar la povo de l' fabriko estis tro malgranda rilate al la mendoj. La fideleco de la konsumsocietoj estis mirinda. Ĉiuj senescepte vendis la margarinon de K. F. La produktado de margarino en la kooperativa fabriko dum 1927 sumiĝis je dek milionoj da kilogramoj. Per la agado de K. F. la kartelo devis plibonigi la kvaliton de sia margarino kaj tamen malaltigi la prezojn.



La plej granda margarin-fabriko

La muelejoj de K. F.

K. F. do sukcesis venki unu el la monopolistaj karteloj kaj marŝis pluen. La dua estis la muela kartelo, kies prezpolitiko nature ne traktis en plej bona senco la konsumantojn. Pro la naturo de la sveda terkulturado la lando devas grandkvante kontentigi sian bezonon da greno el eksterlando. La importo de greno sinsekve okazigis, ke la muelejoj estis konstruataj en la havenurboj. La plej grandaj fondis kartelon kaj deviĝis la pli malgrandajn aliĝi al ĝi. K. F. rimarkis ke inter la prezo de faruno kaj la prezo de greno ekzistis tro grandaj diferencoj. Tial oni intencis konstrui propran muelejon en la jaro 1922. El soci-ekonomia vidpunkto tio tamen ne estis oportuna, ĉar jam ekzistis sufiĉa nombro da muelejoj por la bezono de Svedio. K. F. tiam agadis tiel, ke granda "skuiĝo" okazis en la kartelo, kaj la asocio povis poste aĉeti unu el la plej grandaj muelejoj en Stokholmo "Tre Kronor" (Tri Kronoj), ĉe la haveneniro de Stokholmo. Post plena modernigo ĝin nun prizorgas la bezonon de faruno por la konsumsocietoj en norda kaj meza Svedio. Ne longtempe ĝi restis la sola muelejo de K. F. Depost 1924 la asocio posedas ankaŭ la muelejon "Tre Lejon" (Tri Leonoj) en Göteborg, kiu nune prizorgas la bezonon de la konsumsocietoj en la suda kaj okcidenta partoj de Svedio.

Okazis nun per la interveno de K. F. la sama spektaklo, kiel pri la margarina trusto. Fariĝis pli malaltaj la prezoj de faruno, kaj tio kreis grandajn simpatiojn por la movado eĉ en rondoj, kiuj pli frue estis malamikaj al la kooperativa movado. La produktado de faruno en la muelejoj sumiĝis en 1927 je 95 milion. da kilogr.

Aliaj industrioj

La industria evoluo de la kooperativa movado en la lastaj jaroj daŭris en pli rapida kreskotendenco. 1925 K. F. aĉetis jam produktantan ŝufabrikon en Örebro. Venis la ĉefoj de K. F. al la loko kaj demandis la posedanton, ĉu li volas vendi la fabrikon aŭ ne. Li respondis nee. K. F. do minacis per aĉeto de terpeco sur kiu oni konstruus novan fabrikon. La posedanto plu ne povis kontraŭstari, sed vendis la fabrikon. Oni nun timas la kooperativon en komercaj rondoj. En la jaro 1926 K. F. pereigis kartelon en la galoŝa trusto. La prezoj de galoŝoj jam de longe estis tre altaj, kaj kiam K. F. decidis mem komenci fabriki tiun varspecon, la nura decido kaŭzis malaltigon de la galoŝaj prezoj je du kronoj popare. K. F. tamen aĉetis galoŝfabrikon, kaj nun oni povas ricevi galoŝojn por tre malalta prezo. En la proksimaj jaroj sekvos aliaj industriaj entreprenoj.

John Johansson.

(Daŭrigota.)

PLENA DEMOKRATIO

“Ĉe ni en Svedio regas plena demokratio.“ Tiel parolis sveda K-do dum la malferma kunsido de la 8-a SAT-kongreso en Göteborg.

Tion aŭdinte, mi ĝojis, esti en plendemokrata lando kaj ekinteresiĝis, iom pli detale rigardi ĉion, por scii, kiel do aspektas “plena demokratio“.

Certe ne nur min mem, sed ankaŭ aliajn proletojn interesas tiu “plena demokratio“, ĉar ĝi ja estas sufiĉe aktuala demando. Konsiderinte tion, mi ĉi sube priskribas la rezulton de mia studo por la Legantaro de “S-ulo“.

Plej unue mi konstatis, ke al plena demokratio apartenas reĝo. Kvankam mi mem ĝin ne vidis, do sur preskaŭ ĉiuj poŝtmarkoj estas videbla, kiel aspektas la vizaĝo de tiu persono — kompreneble pli bone sur la nestampitaj poŝtmarkoj. Tiu reĝo nomiĝas Gustavo, numero kvin.

Kaj veninte al Stokholmo, kun pro ĝoj’ frapanta koro mi rigardis la paradon de la “reĝa gvardio“ antaŭ la reĝa kastelo. En brilaj uniformoj, epoletojn sur la ŝultroj, kaj sur la kapo kaskojn, kiujn antaŭ longa, longa tempo — — ho, kun melankolia koro mi rememoras tiun belan malnovan tempon, kiam la prusa militarismo brilis en same “belegaj“ uniformoj . . . Kaj kiel belege estis, kiam per groteskaj movoj kaj konduto okazis la ŝanĝo de la gardostarantoj, kaj ili salutis kaj honoris la reĝon — aŭ pli ĝuste la sanktan spiriton, ĉar “lia reĝa moŝto“ mem forestis por ĉasi. Kaj la muziko ludis — ludis melodiojn, kiujn mi publike aŭdis nur antaŭ longa, longa tempo, kiam malgranda infano mi ankoraŭ estis. Povas esti, ke oni ilin ankoraŭ hodiaŭ ludas en Germanio; sed ĉar mi ne vizitas faŝistajn festojn, mi do ne plu aŭdas ilin.

“Sed la reĝo ne regas“, oni informis min. “Li mem zorgas pri tute nenio; li nur ricevadas sian salajron kaj okupiĝas nur sole pri sia sporto. Kiu regas, estas la parlamento!“ La reĝo Aŭgusto de Saksio post la revolucio (1918) diris: “Nu, do mem faru vian sterkon!“ Kaj per tiuj vortoj li abdikis. Kaj jam antaŭe li sin dediĉis nur al sia sporto, kiu konsistis en biertrinkado. Ankaŭ en Svedio jam dum la regado de la reĝo regas “plena demokratio“; nur kun tiu diferenco, ke tie la reĝo ne vizitadas drinkejojn, sed trinkas hejme — — pardonu, mi volis diri: foriras por ĉasi!

Kaj regas la parlamento. Kaj ne nur unu parlamenton oni havas. Ĉar regas vera, “plena“ demokratio, oni havas eĉ du parlamentojn! Nome: unuan (superan) ĉambron kaj duan (malsuperan) ĉambron. Por la dua ĉambro ĉiu viro kaj virino 23-jara rajtas voĉdoni en rekta baloto. T. e. oni rekte elektas la delegotojn. Elektotaj povas esti ĉiu viro aŭ virino, kiu havas 25 jarojn. Por la unua ĉambro rajtas voĉdoni nur tiuj, kiuj havas aĝon de 27 jaroj. Pro tio povas okazi, ke delegito de la dua ĉambro eĉ ne havas la voĉdonrajton por la unua ĉambro. La baloto por la unua ĉambro estas nerekta. La voĉdonrajtaj personoj elektas tiujn, kiujn oni nomas “elektor“. Kaj nur la elektitaj “elektor“-oj tiam elektas la delegitojn por la unua ĉambro. Sed delegitoj en la unua ĉambro povas esti nur tiuj personoj, kiuj havas jaran enspezon de almenaŭ 3000 kronoj.

Iom stranga geometrio regas en la balotleĝo: ju pli granda estas iu partio, des malpli da voĉoj ĝi bezonas por unu “elektoro“. Ekzemple bezonas la socialdemokratoj por unu elektoro 8000 voĉojn, dum la komunistoj bezonas 13 000. Nature la unua ĉambro nepre konservas sian reakciecon — ĝi estas ŝirmilo de la burĝaro.

Meze de septembro okazas novbaloto por la parlamento. En la malnova parlamento estas en la unua ĉambro 150, en la dua 230 delegitoj. El tiuj estas en la unua ĉambro 48 soc. demokratoj, 1 komunisto, en la dua 105 soc. demokratoj, 4 komunistoj. Por la urbaj parlamentoj rajtas voĉdoni eĉ nur tiuj viroj kaj virinoj en aĝo de 23 jaroj, kiuj dum la lastaj tri jaroj por almenaŭ unu jaro pagis impostojn.

Kiel nun regas “la parlamento“?

Por ĉiuj decidoj necesas la absoluta plimulto en ambaŭ ĉambroj. Tio signifas, ke la koncerna decido kun plimulto devas esti akceptata en ambaŭ ĉambroj. Tiel ekzemple malakcepto en la unua ĉambro povas faligi decidon de la dua ĉambro aŭ inverse. Kaj por definitiva validiĝo[1] de decido akceptita en ambaŭ ĉambroj estas necesa ankoraŭ la subskribo de “lia reĝa moŝto“. Sole en financaj aferoj decidas la absoluta plimulto de ĉiuj 380 delegitoj de ambaŭ ĉambroj kune.

Strange estas ankaŭ, ke en tiu “plendemokrata“ lando la laboristoj estas same ekspluatataj de la kapitalistoj, kiel en ĉiuj aliaj kapitalistaj landoj. Mi nur citu, ke la bankkapitalisto Valenberg (svede: Wallenberg) dumjare havas netan gajnon de du milionoj da kronoj. Tiu sola lasta fakto sufiĉas, por klarigi, ke ankaŭ en la “plendemokrata“ Svedio kreskas la radiko de la Proletara Revolucio. Pligrandiĝas la nombro de la klaskonsciaj proletoj, kiuj luktas por la “vera proletara demokratio“, dum kiu ili ne plu estos devigataj, doni al privata bankkapitalisto, kiu kreas neniun valoron, salajron de du milionoj da kronoj. Petro (920).

[1] Leĝa valoriĝo.

★ DIVERSAĴOJ ★

Unuecigo de l’ alfabetoj

En Konstantinoplo estas elektita komisiono, kiu havas la komision ĝeneraligi la novajn turkajn litertipojn (latinajn). Depost tiu ĉi lernjaro la instruado en la klasoj okazos kun la novaj litertipoj. Malsuperaj inspektoroj iros en la vilaĝojn por instrui tiujn literojn al la instruistoj de l’kamparo kaj de la provinco.

Peto pri plua informo

En “S-ulo“, n-o 207, Ino-Kor. raportis, ke “depost tiam (minista striko en Kolorado) laboristoj sekvas la revolucian organizon (I. W. W.)“. Ĉu nia K-do povos doni statistikon pri tiu organizo, ĉar laŭ komunistaj kaj socialistaj ĵurnaloj ĝi preskaŭ ĉie malaperis pro internaj konfliktoj kaj registaraj atakoj? La nuna anaro kompare kun tiu antaŭ 1914, montrita per statistiko, tre helpus nin prijuĝi la aferon objektive.

Pri alia malpli grava afero: La nomo “Uoblis“ (Wobblies) laŭ famo kaj laŭ la verkoj de U. Sinkler devenis el peno de ĉinoj servantaj en restoracioj elparoli la mallongigitan titolon “I.W.W.“. Kiu pravas? Kredeble tiuj aferoj sufiĉe interesas K-dojn por meriti presotan respondon. (488)

Kroniketo el Hispanio

Tre malofte estas videblaj en Hispanio civil-geedziĝoj. Respublikanoj, socialistoj, komunistoj, anarkistoj ktp. ĝenerale ankaŭ submetiĝas al religia geedziĝo. Sed ne malhelpate de malfaciloj, estas tute libere por ĉiu en Hispanio geedziĝi, ĉu civile, ĉu religie. La leĝoj eĉ diras, ke eklezia geedziĝo ne valoras, se ĝi ne estas samtempe civila. Pro tio en preĝejo, kiam iu geedziĝo okazas, ĉeestas la juĝisto kiel reprezentanto de la Leĝo, kiu notas en civila libro la novan geedziĝon.

Tamen kvar Gek-doj, ĉiuj SAT-anoj, dum junio geedziĝis civile, **ne** religie. Eble en multaj landoj, preskaŭ ĉiuj, tio estas sensignifa novaĵo, nemenciinda, sed por ni estas granda novaĵo, kiu montras konsekvencecon en agado kaj pensado. Multaj kutime pensas iel, sed agas tute kontraŭe je sia pensado. En Hispanio estas proverbo, kiu diras: “Preferinda estas unu fakto, ol cent paroladoj.“

La novaj geedzoj estas Gek-doj 5437 kaj 8093 el Sabadell, kaj Gek-doj 6187 kaj 8163 el Barcelona kaj Palafrugell. Kosma Energiero (357).

SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al iu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

SENNACIULA SPORTA PAĜO

Kompilanto: Ad. Wendt, Leipzig O 27, Lange Reihe 11-a (Germ.)

Kial "laborista sporto"?

Multaj Gek-doj eble miros, legante la supre cititan demandon. Sed ŝajnas al mi necese, montri al la ĝis nun n e t u t e klaskonsciaj Gek-doj la diferencojn inter burĝa kaj laborista sporto. Mi diras: ne tute konsciaj Gek-doj. Kial? Ĉar multaj laboristoj — eble ankaŭ esperantistoj — kvankam ili povas esti bonaj sindikatanoj, partianoj ktp., tamen ankoraŭ apartenas al burĝaj sportasocioj. Precipe ĉe ni en Germanio multaj bone organizitaj laboristoj estas anoj kaj membroj de la t. n. "Germana Gimnastularo". La kialon mi kaj eble eĉ ili mem ne komprenas. Do, kiuj estas la diferencoj inter burĝa kaj laborista sporto? Dum la plej alta celo de la burĝa sportularo estas atingi rekordojn sen indulgo pri la korpo, plej alta nia celo estas, peri al ĉiu homo sanan kaj belan korpon per la laborista sporto. Sed tio ne estas ebla, se oni aplikas la rimedojn de la burĝaro. Se iu el ili atingis ion, oni ĉiam kaj ĉiele favoras lin sen konsidero pri aliaj ankaŭsportuloj, kiuj per tia malfavorigo sin certe sentas ofendataj. Do oni faras el ili t. n. "sportkanonojn", tiujn duon-diojn, kiujn la naciece ensorĉitaj anoj adoras. Kaj la naciaj sportgazetoj — ankaŭ la politikaj — abunde laŭdas la naciajn sportistojn. La finaciemo sporta eĉ povas atingi tian gradon kian en Amsterdamo okaze de la sport-olimpio, kie germanaj piedpilkistoj en la ludanta konkuranto eksterlanda vidis la malamikon kaj ludis tiel krudece, ke kelkaj ludistoj vundite devis forlasi la sportejon. Tio tute ne povas okazi ĉe ni, ĉe la laboristaj sportuloj. Nin ligas la internacia frateco, la internacia amo. Kiel jam dirite, ni celas unuavice peri al ĉiu sanon kaj belecon de la korpo. Kune ni ekzercadu, amase ni sportadu. Neniu estu malfavorata, neniu favorata. Se ni tiel agas, ni certe sukcesos. Tiel ni samtempe edukas la homojn al solidareco — al reciproka amo, kaj ĉiu trovos tion, kion li deziras: egalrajtecon kaj sanan korpon. Mi ne volas diri, ke ĉe ni bonaj rezultoj ne estas atingeblaj kaj atingataj. Tute ne. Multaj el ni povus rompi mond-rekordojn, povus atingi famon, sed tio ja ne estas nia afero. Do konkludu, Gek-doj, kaj e k s i ĝ u el la b u r ĝ a j, a l i ĝ u al la l a b o r i s t a j s p o r t a s o c i o j ! R. C z a p p e c k (10876).

EL-UFFI alkuris

Ĉi malsupre ni represas tradukon de artikolo de fama sovetia ĵurnalisto. Kvankam la temo jam malaktualiĝis iagrade kaj la sama temo jam abunde estas traktita en la gazetaro de ĉiuj landoj, ni prezentas ĝin al niaj legantoj. Sed ni insiste petas, ke oni estonte konsideru, ke "S-ulo" ne povas plenumi la taskojn de la tag-gazetoj kaj "S-ula Sporta Paĝo" nur aperas unufoje monate. *S p o r t f a k u l o.*

Fajroj kaj flagoj de l' Spartakiado kolorigis Moskvon. Antaŭ la okuloj jen rapide aperas kaj malaperas ĉemizoj de l' interbatalantaj piedpilk-ludantoj, jen brilas blankaj pantalonoj de l' tenis-ludantoj, jen baraktas bronzkoloraj korpoj de l' naĝantoj, jen peze faladas bastonegoj de "gorodki" — ludo ruinigante for la lud-figurojn "kjelbasojn", "avinojn en la fenestro" kaj "riĉajn mortintojn". La presistoj ludante interdiskutas kun ledistoj, sukeraĵistoj — kun metalistoj, kaj nutraĵindustriaj laboristoj kun kemiistoj.

Ni ne timas ke tiuj diskutoj disŝiros la "VCSPS" — la Tutsovetian centran Union de l' profesiaj Unuiĝoj, same kiel ni ne atendas, ke inter Ukrainio kaj Urugvajo okazos milito rezulte de la malkvieta piedpilk-ludo nun okazanta...

Al la viglaj raportoj pri la multnombraj konkuroj de l' senlima programo de la Spartakiado ni deziras, por fari iun diversaĵon, aldoni ankoraŭ unu raporton. Tiu raporto estas el la kontraŭula tendaro...

Ja la tutproleta kongreso de la gesportularo havas en la kontraŭula tendaro sian klasan sport-rivalon (sport-konkuranton). Pli aĝa, ankoraŭ pli sperta, diferenca same, kiel diferencas la burĝaro de l' proletaro. En Amsterdamo, en Nederlando, ĵus finiĝis la ordinara tutmonda Olimpiado. La lasta kaj plej ekscita, plej sensacia momento de la Olimpiado estas la maratona kuro. Severa, timiga, senindulga ekzameno por la homaj fortoj.

En la tago de l' maratona kuro la tribunoj estis eksterordinare troplenigitaj. La riĉulara luksege vestita rigardantaro el tuta Eŭropo alveturis por ĉeesti tiun ekscitaĵon. Interalie do ili kunvenis ne nur pro sport-ŝatado. Ĉeesti hodiaŭ la stadionon signifas montri, al kiu ŝtupo de l' aristokrataro oni apartenas.

El HAGO plen-are la Nederlanda registaro venis por ĉeesti la feston. Fine "lia moŝto" princ-edzo Henriko ankaŭ estas vidata en la reĝa loĝio. Strangan rangon havas la princo Henriko. En Nederlando reĝino Vilhelmino regas. La princo do estas nur ŝia edzo, ne havante la reĝ-rajtojn. Por viro laŭ burĝaj tradicioj tiu stato de l' "reĝino en pantalonoj" estas maloportuna. Sed la princo post la multaj jaroj kutimiĝis al tio, la holandaj civitanoj ankaŭ. La princ-edzo sintenas, laŭ ilia opinio, tute indece, li kompletigas la reĝinon kaj helpas al ŝi ŝin reprezentante.

Jen nun ankaŭ la princo, malpliigante regad-ŝarĝon de sia honora edzino, venis Amsterdamon por partopreni la ceremonion okaze de la maratona kuro. Laŭ la ceremonar-postulo de la Olimpiado, la princ-edzo tuj post la fino de la konkuro iros el la loĝio, venos al la feliĉa venkinto, forte premos lian manon kaj oficiale salutas lin je la nomo de l' Nederlanda reĝino.

La kuro jam komenciĝis. La senfina laceg-iga kuro je la timiga distanco de 42195 metroj. Tio ne estas ordinara konkuro je cent-metra distanco, kiam iu neatendita okazo povas ludi gravan rolon, maloportuna piedturno, superflua aer-engluto, superflua salto. Tie konkuras homorganismoj paŝo post paŝo ruinigataj ĝis fino. Tie konkuras por pruvi sian harditecon efektivaj vivaj maŝinoj, iliaj aranĝoj, la rezervoj de l' energio, eluziĝo de la maŝin-partoj. Dekoj da nacioj, rasoj de ĉiuj partoj de la mondo venis Amsterdamon kaj la reprezentantoj de ĉiu el ili volas pruvi, ke ĝuste lia patrujo posedas la plej fortan homo-maŝinon.

Malrapide, sed malcedeme rampas la tempo. La fino alproksimiĝas. La tribunoj komencas nerveme zumegi. La elektraj montriloj signalas pri la konkur-stato. Jam multaj dezirintaj venki restis malantaŭe. Antaŭe restis nur malgranda grupo. La kuro jam daŭras du horojn. Ankoraŭ proks. tridek minutoj pasos kaj la mond-majstro por la maratona kuro renkontata de l' orkestro-ludoj ekaperos antaŭ la entuziasmigita brueganta, luksvestita rigardantaro kaj ekpremos amikece etenditan al li manon de la ornamita en or-kudraĵo princ-edzo.

Ŝajnas, ke Japanio venkos. Dek-naŭ kurantoj restis malantaŭe, en la unuaj lokoj estas la japanoj Trude kaj Jamanada. Antaŭ ĉies okuloj la princo Henriko peze, naĝ-simile paŝas el la reĝa loĝio kaj malsupreniĝas sur la placeton al la loko, kie oni finos la kuron, al la revata de la kurantoj papera rubando, kiun traŝirinte la venkonto solene finos sian kvardek-kilometran kuron. Sed io okazis kun la japanoj. Ili estas restigataj malantaŭe. Dum la lasta kvaron-horo novaj kandidatoj sin ŝovis antaŭen. La elektra montrilo malpaciencige eksaltis ekscitante la publikon ĝis la lasta grado de l' histeria nerv-streĉo.

Francio? Ĉilio? Oni povas nenion kompreni! Mil-dekoj da okul-paroj lasante la signaltabulojn sin direktas tien malproksimen al la ŝoseo. Kaj jen en la polva nubeto estas apenaŭ distingata malgranda figureto. Lornon uzante, penante distingi ĝin la rigardantaro entuziasme krieganta ekkonas bluan koloron de la ĉemizo — la kolorsignon de Francio. La figureto alproksimiĝas, sed ne pligrandiĝas. Ĝi ial iĝas ĉiam pli kaj pli nigra. La rigardantoj viŝas la okul-vitrojn, la vitrojn de la lornetoj. Ili kun malpacienca konsterno ekprenas programfoliojn. Iu malkompreniĝo okazis...

Jes malkompreniĝo, pli ĝuste maloportuna surprizo. Malgranda negro EL-UFFI, sportulo el francia kolonio — jen kiu venis kiel unua en la tutmonda maratona konkuro. La figureto alproksimiĝas, jam estas distingeblaj la bukla kapo, la korpo lakita de l' ŝvito, la brilantaj malfermegitaj ĝojaj okuloj. Sed la tribunoj eksilentis kvazaŭ mortintaj, la orkestrantoj malsuprenprenigis pretigitajn por saluti siajn lud-instrumentojn. En la morta senbrueco, en la timiga silento de tridekmilo da rigardantoj EL-UFFI jam per la trolacigitaj piedoj ĉirkaŭkuras la stadionon. Malproksime falŝanceliĝante lin sekvas ĉiliano PLAZA.

La negro traŝiras perbruste la kontrolan rubandon. Li venkis, li estas la mond-majstro en la maratona kuro. Sed la princ-edzo antaŭ ĉies okuloj turnis sian dorson al EL-UFFI kaj farante rektajn palacanajn paŝojn li foriras en sian loĝion.

Premi manon de l' negro, malsanktigi sin per la intertuŝeto, kaj eĉ publike, kun la malpli nobla raso — tio ne estas inda por la princ-edzo. Kion diros Nederlandaj oficistoj en Javo, kiuj per vipoj krevigas haŭton sur la dorsoj de l' koloniaj sklavoj, se ili ekscios, ke ilia potenculo permane salutas la kolorhaŭtulojn?

Publike ĉirkaŭkraĉita nigra sportulo staras apud la rubando ne sciante kien li devas sin ŝovi. Ĉiuj lasis lin kvazaŭ pestulon. La tribunoj jam venkis sian rigidiĝon. La lukse vestita rigardantaro salutas... ĉilianon, kiu venis kiel dua. Ili aplaŭdas al iuj sud-amerikaj sinjorinoj, kiuj delikate ĉirkaŭvolvas la ĉilianon Plaza en Ĉilian standardon. Kaj la princo Henriko en sia loĝio simpatie mansalutas nederlandajn kurintojn, kiuj venis en lastaj lokoj.

Ĉirkaŭ la fiago de la princo ekflamis iu skandalo. Kelkaj ĵurnaloj akceptis ofendon al EL-UFFI kiel ofendon al Francio, kies simbolo estis brodita sur la ĉemizo de la negro. Aliaj aŭtoritate klarigis, ke Lia Moŝto ne povis intertuŝeti kun la nigrahaŭtulo, eĉ ne se li estas mondmajstro, kaj delegito de Francio.

Malfeliĉa EL-UFFI, lerta kurulo, bona negro. Per nenio ni povas konsoli lin kaŭze de la malhonoro, kiun li ricevis. Se nur... se la malfeliĉulo povus sin transporti pense je mil kilometroj orienten en la viglan spartakiantan MOSKVON, kie oni ne nur premas manon de negroj sed eĉ hurakrias ilin, kie najbare kun la internacia proleta sport-festo kunsidas internacia kongreso de l' batalantoj por liberigo de la kolonia sklavaro... Tiam EL-UFFI eble ridetus kaj ekkraĉus la "Moŝtajn" favorojn de la nederlanda maljunulaĉo.

M i ĥ. K o l c o v.
El "P r a v d a" (VERO) n-o 192
trad. H. Ponjatovskij.

TRA ESPERANTIO

INTER NI

— Ricevinte "S-ulo"n, mi tuj serĉas la paĝon sur kiu troviĝas "Inter Ni". Kaj mi demandas min: "Kiun hodiaŭ kritikas, mokas, pikas tiu nekontentigebla E. L.?"

Verdire mi ne ĉiam konsentas kun vi; mi eĉ emas pensi, ke intence vi donas ian paradoksan formon al viaj ĉi tieaj artikoletoj . . . Almenaŭ mi konfesas, ke aprobantoj kaj malaprobantoj estas instigataj al pripensado. Kaj pro tio oni multon povas pardoni al vi . . .

Sed, diable! kial vi kuraĝas kritiki eĉ famulojn kiel H. Barbüs? Vi atentu! . . . Respektu idolojn. Aliel vi riskas malkontentigi kaj eĉ kolerigi ties adorantojn . . .

— Estas fakto, ke mia kritiko kontraŭ la fama aŭtoro de L' Fajro venigis al mi kelkajn riproĉajn leterojn. K-doj prenis sur sin la zorgon pledi por la akuzito. La karaj "advokatoj" ne tiom ekscitiĝu! La famo de ilia idolo ja ne estas en danĝero pro mia artikoleto. Se tiel estus, Barbüs mem kapablas sin defendi. Ni volonte publikigus lian pravigon. Eĉ se ĝi ne estus verkita en esperanto! . . .

Per mia kritiketo mi celis nur instigi la K-dojn, ke ili ĉiam prefere ŝatu agojn ol belsonajn frazojn. Agoj ja parolas pli elokvente ol vortoj. Simpla laŭdado de esperanto ne valoras, se la laŭdanto mem scipovas nur laŭdi . . .

La sola valora argumento de la "defendantoj" de Barbüs estas, ke la famulo ne havis tempon por lerni nian lingvon. Ĉu ili estas certaj pri tio? Ĉu do tiom informitece ili konas lian intiman vivon? Kiel K-do Izgur trovis tempon por lerni esperanton kaj poste per ĝi eĉ literaturi?

Sed ni supozu, ke la aserto ĝustas. Ĉu tio povus pravigi la fakton, ke en Mondo, la revuo kiun gvidas Barbüs, neniam ĝis nun aperis eĉ plej malgranda noto pri esperanto aŭ pri nia movado?

— Mi skribis al Barbüs pri tio, kaj scias, ke aliaj K-doj ankaŭ skribis . . .

— Mi ĝojas, ke mia kritiketo instigis al tia skribado. Se iun belan tagon aperos en Mondo raporto pri la esperanta movado, nu, tiam eble mi pentos pro mia nesufiĉa respekto al famuloj — kaj gardos tamen la konvinkon, ke la riproĉata "Inter Ni" ne estis senutila . . . E. L.

NAŬA SAT-KONGRESO EN LEIPZIG

La Leipziga SAT-anaro elektis kongres-komitaton por la 9-a SAT-kongreso konsistantan el jenaj K-doj: Bässler, Wendt (organizado); Kampfrad, Lerchner (financaj aferoj); Lämmerhirt, Richter (loĝeja, akcepta, korespondа aferoj). Kongres-aliĝilo baldaŭ estos dissendata.

EL LA REDAKTEJO

Ni ne havas kaŭzon por plendi pri manko de manuskriptoj. Ni eĉ ne ĉion taŭgan povas enpresigi. Antaŭ ĉio ni devas insisti, ke la K-doj, kiuj volas sendi al ni iun artikolon, pripensu sufiĉe longe kaj konscience, ĉu vere la sendotaĵo plaĉos al la Legantaro de "S-ulo". Ni ricevis lastatempe pli ol unu fojon tradukojn. Ili estis zorge faritaj, lingve preskaŭ senriproĉaj. Sed ni ripetu ankoraŭfoje, ke ni multe pli preferus ricevi de tiuj laboremaj K-doj originalojn. Ili ne plendu, se iliaj traduklaboroj ne povos aperi, precipe tiuokaze, se ili estas treege ampleksaj. Ili neniam forgesu, ke nia Legantaro preferas mallongajn artikolojn. Tion konsideru la kunlaborantaj K-doj.

Por la rubriko "Memornoto" ni ricevis kelkfoje lastatempe pruvekzemplerojn de gazetoj, en kiuj ne estis notita la deveno de l' enpresita traduko. Tio estas malbona servo, kiu neniom utilas al nia afero. K-doj, kiuj liveras nian materialon al gazetoj, nepre insistu, ke la redakcioj notu la fonton de tiuj artikoloj. Ni havas la rajton postuli tion. Ĝi estas la minimuma rekompenco, kiun ni devas elakiri por niaj servoj. N. B.

——«o»——

NEKROLOGO

Nova viktimo de l' kapitalismo! La 16-an de sept. mortis en Zaragosa (Hisp.) 22-jara la sindona kaj fervora SAT-ano (6190) **Gracia Galan José.**

Por eviti militservadon li venis en Francion en 1926. Ne trovinte okupon en sia metio (lignaĵarto) prefere ol almozpeti li akceptis ian ajn laboron. Pro la malbonaj kondiĉoj, kiujn li spertis, malsano kaptis lin. Kaj tiel li revenis en Hispanion nur kiam li ne plu taŭgis korpe por esti soldato.

Eble ne ĉiuj, kiuj renkontis kamaradeton José, sciis tute pri liaj bonaj kvalitoj; malriĉa li donacadis al SAT; kvankam okupita per peza kaj teda manlaboro, li tamen trovis tempon kaj energion por kleriĝi; li eĉ akiris kapablon verki preskaŭ perfekte en esperanto. En racie organizita socio, tia homo, kia estis K-do Gracia, povus malvolvi ĉiujn siajn kapablojn kaj anstataŭ antaŭtempa plorinda morto, SAT povus multe profiti el tiu juna oferema vivo.

Tia morto estu por ĉiuj SAT-anoj nova instigo al senlaca batalo kontraŭ la krima kaj stulta nuna sociordo.

E. K. L.

Al ĉiuj liberpensuloj, liberpensulaj organizoj kaj gazetoj

Al ĉiuj fervoraj SAT-anoj

La 11-an de sept. Centra Kom. de Ateista Unio (Sovetio) aŭskultis en sia kunsido la raporton pri organizo de l' sekcio de esp-istoj-ateistoj. La organizo estas aprobita; por gvidi ĝin estas elektita de CK Ateist-Unia aparta K-do. Ankaŭ aprobita estas sekcia statuto. De nun la oficiala organo de l' Unio "Bezboĵnik", ĉiam volonte jam antaŭe enpresinta peresp-an materialon, havos en sia titolo la surpreson "Oni korespondas esperante". La sekcio jam ekfunkciis kaj per tiu ĉi informo deklaras pri siaj ĉefaj taskoj.

1. Perado en intern. interliberpensula korespondo, ĉu por organizoj, ĉu por gazetoj; 2. Helpado al vizitantoj Sovetion esp-istoj-liberpensuloj en iliaj interrilatoj kun ateistaj organizoj; 3. Peresp-a priservo de ekstersovetia liberpensula gazetaro; 4. Gvidado en intern. korespondo, helpo tiurilata al komencantoj ateist-esp-istoj; 5. Propagando de esp-o inter sovetia ateistaro. — Pro la cititaj taskoj Centra Estraro de la Sekcio turnas sin al ĉiuj fervoraj SAT-anoj liberpensuloj kaj petas konstante korespondi al la ĵurnalo "Bezboĵnik" (Moskvo, Stretenka 10). La redakcio tre bezonas eksterl. korespondantojn. La korespondaĵoj estas dezirataj precipe pri agado de eklezioj, pri liberpensula proletmovado en div. landoj. Agado de misiistoj kristanaj kaj ties organizoj ankaŭ interesas sovetian ateistaron. Krom tio ni donos periode en "S-ulo" interesajn temojn por korespondaĵoj. Ĉiu interesiĝanto povas peti specimenon de "Bezboĵnik" de l' redakcio. Ĉiu korespondinto rajtos ricevi la n-ron, en kiu estos presita lia artikolo aŭ letero. Ni ankaŭ petas ĉiujn sindonemajn SAT-anojn peradi en esp-o por lokaj liberpensaj organizoj por ties koresp. kun sovetiaj ateistaj organizoj aŭ redakcioj. Ni petas liberp. div. landajn gazetojn kaj organizojn koresp. kun CK de Ateista Unio precipe en esp-o, ĉar multaj el ili jam uzas esp-on en sia intern. koresp. Al redakcioj ni proponas interŝanĝon de materialo kun red. de "Bezboĵnik" (semajna org.) kaj "Antireligioznik" (gvidorgano monata) en esp-o. Liberpensuloj-proletoj, plifortikigu intern. interligon vian, uzu por tiu celo esp-on, korespondu kun sovetiaj ateistoj kaj ties organizoj, laŭ adreso supre citita de "Bezboĵnik". Kiu volas havi apartan korespondanton, aŭ ateistan ĉelon, sciigu sian adr. al Centra Estraro de l' Ateista Sekcio, Moskvo 19, Znamenska 18, MK SEU por Ateista Sekcio[1].

Prezidanto de Centra Estraro Ateistsekcia
N. Incertov.

——«o»——

ESPERANTO-SERVO DE SAT

Denove ni atentigas, ke leterojn kaj aliajn poŝtaĵojn ni nur transsendas aliloken, se antaŭe ni estos ricevintaj la afrankon. Ĉar mono mankas por tiaj elspezoj, ni estos devigataj simple flankenmeti tiajn poŝtaĵojn. Seriozaj kaj mallongaj raportoj por materialo de Esperanto-Servo estas tre dezirataj. Do tiurilate subtenu nin plej aktive — pli ol ĝis nun.

Centrejo de Esperanto-Servo.

[1] Ni petas represi la artikolon en naciaj liberp. gaz. kaj sendi specimenon.

EL NIA LETERARO

Ni ricevis jenan leteron, kiun legos kun intereso nia tuta Legantaro. Pri la solvo (se solvo ekzistas) al tiu problemo ni lasas la zorgon al la Lingva Komitato. Red.

Legante la artikolojn kaj anoncojn pri Plena Vortaro de Esperanto, mi ankaŭ volas rimarkigi tre gravan, por la perslingvanoj, demandon. Esp-o havas kelkajn vortojn similajn al maldecaj persaj vortoj. Vi scias, ke orientanoj, precipe la persoj, estas tre komplimentemaj kaj ĝentilaj, kaj bedaŭrinde kelkaj esp. vortoj koincidas kun persa maldeca vorto. Mi hontas ilin citi, sed mi devas rimarkigi ilin kaj peti de vi la savmanieron.

Mi notas nur tre gravajn vortojn: 1. La vorto KUN (perse: elirejo de ekskremento, la parto de la korpo, kiun oni metas sur seĝon, kiam oni eksidas). Ankaŭ la derivaj vortoj: kune, kunigi, kuniĝi. La vorto "kune" estas proksima al la persa vorto "kuni", kiu signifas: Knabo, kiu prostituas — prostituisto. Tiu ĉi vorto (kuni) estas tre maldeca insulto. La ofendito povas plendi ĉe la juĝejo, kaj la insultinton laŭleĝe oni monpunas. 2. La dua maldeca vorto: RIDI. Ĝi signifas: Vi ekskrementis, vi malpurigis per ekskrementaĵo. 3. La vortoj komenciĝantaj per silaboj KIR (perse — vira seksa membro) kaj KOS (virina seksa membro), ekz.: akiri, kosti, kunakiri. Efektive la cititaj vortoj por ni estas ne elparoleblaj. Mi ne povas legi laŭte esp-an tekston, mi ne povas propagandi inter perslingvanoj, mi ne povas instrui al virinoj, al knaboj. Bonvolu savi kaj gvidi min. Mi petas pardonon. Mi nenion povas proponi. Laŭ vi tiu ĉi demando ŝajnas ridinda kaj neatentinda, sed por ni ĝi estas gravega. Persa lingvo estas parolata en Persio, Kaŭkazio, Turkestano, Hindio, Mezopotamio kaj eĉ en Turkio. Bedaŭrindege mi ne estis kun Zamenhof kaj mi lernis esp-on en 1924. Se mi renkontus d-ron Zamenhof, mi petegus lin ŝanĝi tiujn ĉi honte elparoleblajn vortojn, kaj li akceptus mian proponon, tial ke li neniam uzis ekz. la vorton Ĉeĥujo pro koincido kun rusa maldeca vorto. Zamenhof ne sciis orientajn lingvojn, kaj tial li uzis tiajn malbone elparoleblajn vortojn. Mi ne povas tute silenti kaj nenion diri. Mi por la bono kaj la propagando de esp-o deziras ion proponi. Mi scias, ke vi legante mian leteron ridos, sed mi akceptas vian ridegadon kaj proponas, t. e. mi demandas: Ĉu estas eble ŝanĝi la vorton "kun" per alia formo, ekz. kan, kon, ken aŭ alia radiko. Same por ni ankaŭ estas ŝanĝenda la vorto: ridi. La aliajn vortojn ni povas iel ajn elparoli kaj ne abomenigi la aŭskultantojn. Sed la du vortoj: KUN, RIDI estas teruraj. Est. K-do, tiu ĉi problemo estas tre serioza kaj grava por la propagando. Ofte la malamikoj de esp-o mokas min per ripetado de la cititaj vortoj. Mi atendas de vi kontentigan solvon kaj antaŭe kore dankas vin.

Sennaciece B a d i u l l a.

—«»—

La danĝera nomo — esperanto!

Ne multaj K-doj scias, ke en Hungario ekzistas fonto, elkonstruita, de naturamikoj, nomata "Esperanto-Fonto". Ĝin konstruis K-doj, naturamikaj esp-istoj, per du kaj duonjara ĉiudimanĉa laboro. Apud la fonto troviĝas rifuĝejo, same konstruita de la esp-istoj. La fonto estas inaŭgurita 12. 8. 28. Partoprenis proks. 500 pers. Nun antaŭ kelkaj tagoj venas la "grandioza" decido de la vilaĝa estraro (apud kiu vilaĝo estas la fonto) ke "konsiderinte, ke tiu loko por rifuĝejo higiene, kiel por la vivo estas danĝera, kaj la nomo e s p e r a n t o estas ofenda el nacia vidpunkto, ĉar ĝi estas internacia, ni avertas la grupon de Naturamikoj, detrui senprokraste la rifuĝejon kaj forigi de la fonto la nomon e s p e r a n t o, plue doni al ĝi konvenan hungaran nomon. — Kontraŭ ĉi tiu decido ne estas eble apelacii. Subskribo de la notario". La terpecon la grupo aĉetis kaj oficiale anoncis tiutempe. Nun ni ne scias, pro kio oni malpermesas, spite tio ke la ŝtata geografia instituto akceptis la nomon kaj n o t i s ĝ i n s u r l a p l e j n o v a o f i c. g e o g r a f i a k a r t o ! Estas farita petskribo al la ministro por popolbono ŝanĝi la decidon de la vilaĝa estraro. Estontano (8464).

—«»—

Oni plendas

Laŭ anoncoj en "S-ulo" mi sendis al esp. grupo ĉe Industri-Pedagogia Teknikumo, Moskvo 66, 2 PI, lernejo "Komintern" Esp., Barnaul, Siberio, 1 PI, esp. grupo, per adr. Ludwig Weidmann, St. Ingbert, Neue Messstr. 22, Saarl., 1 L kun 85 PM, 2 PI, sed ne ricevis ĝis nun resp. Ankaŭ al Esp. soc., Helenes 2, Liepaja, Latvio, mi d u f o j e skribis sen sukceso. Mi jam atendas kelkajn semajnojn aŭ monatojn.

L. P o l a s c h e k, Wiener-Neustadt, Schelmergasse 4 a, Aŭstrio.

—«»—

La militiro kontraŭ SAT

Ni ricevis jenan leteron: "Kara K-do! Mi sciigas vin, ke mi estas devigita ĉesi abonadi vian gazeton, kaj bedaŭrinde mi ne plu povas aliĝi vian Asocion, ĉar ĝi estas en P. malpermesita organizo. Mi estis minac-admonita, ke mi ĉesigu la pluan aliĝon al via Asocio, alie mi povus esti arestita, kaj sekve mi povus perdi mian oficon. Pluajn sekvojn vi komprenas ja mem. Mi restas ĉiam helpopreta por la bona ideo. (Subskribo.)"

—«»—

Esperanto kaj laboristaro en Bulgario

Esp. lab. movado en Bulgario ĝis nun preskaŭ malestis. Antaŭ unu jaro en Sofio, poste en Plovdiv, lab. esp-istoj metis fundamentan ŝtonon por lab. esp. movado en Bulg. Nuntempe en ambaŭ urboj ekzistas grupoj. Ni kredas, ke baldaŭ la lab. esp. movado ĉi tie forte evoluos, ĉar granda parto de l' bulg. esp-istoj estas lab-istoj. En lasta kunsido la lab. grupo de Sofio decidis tuj aliĝi kiel membro al SAT. Ankaŭ la grupanoj unuanime decidis zorgi pri disvastigo de l' SAT-eldonaĵoj inter bulg. esp-istoj. Kvankam esp-o jam estas aplikata en ĉiuj kulturfakoj, ĝia disvastigo inter la lab-istaro estas tre malfacila. La gvidantoj ankoraŭ ne klare ekkonas la utilon de esp-o k dubas pri ĝia sukceso. La grupo decidis, aranĝi murgazeton, esp-e k bulgare, por fari pli bonan propagandon. La unua n-o aperos 1. okt. La grupo ankaŭ havas oficialan korespondanton de "S-ulo". Ni petas eksterl. K-dojn sendi artik. por la murgazeto. P l o s t o t. P o z i t a n o 1. R a b o t n i ĉ e s k a t a P a r t i o, S o f i o, p o r E s p. G r u p o.

——«o»——

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

GERMANIO. Essen. En Gladbeck i. W. okazis 16. 9. distr. lab. esp. konf. vizitita de K-doj el 13 urboj. Matene okazis kurso por kursgvid. kun provlecionoj laŭ rekta metodo. Oni konkludis uzi laŭeble dum la vintra sezono la rektan metodon en kursoj. Sekvis raportoj de la distrikt- k div. grupestroj pri la farita laboro. K-do Schiewe paroladis pri spirito k spirita laboro. La konfer. akceptis kontraŭ 4 voĉoj rezolucion konc. la popoldecidon kontraŭ militŝipoj. Partopreninto de l' SAT-kongr. rap. pri la 8-a. **POLIO. Varsovio.** Kurso ĉe Social. Asocio de Lab. Universitato. Sekcio de Junularo (T.U.R.) organizita de Lab. Esp. Soc. "Laboro". En centra ĉeforg. de P.P.S. "Robotnik" (Laboristo) ĉiulunde aperas longaj artik. de K-do Koss pri esp. movado el prol. vidpunkto, redaktitaj de l' LEA. J. Litauer.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

BES-a adresaro, 1928, de esperantistoj el ĉiuj landoj. Rilate al nacieco, politiko k religio plene neŭtrala. Eld. BES (Bohema Esp. Servo); Moravany v. Ĉ., Ĉeĥosl. — 72 pĝ. k anoncpaĝoj. Form. 11½×14 cm. Prezo 0.50 sv. fk.

Tiu libreto, 7-an jaron eldonita, ĉiam trovas ŝatantojn. Ĝi povas utili al tiuj esp-istoj, kiuj bezonas la lingvon kiel rimedon por korespondadi k interŝanĝi iujn objektojn. La pres-aranĝo ne estas tre klara, la prezento ne tre plaĉa. Krome mi trovis div. preserarojn. B.

Dr. Leop. Dreher, Supera Kurso de Esperanto. Kun antaŭvorto de prof. Th. Cart. Eld. de l' aŭtoro, Kraków (Polio). 68 pĝ. Nur en esp-o. Form. 12×16 cm. Prezo nemontrita.

Hitherwood, Internacia Gastejo en Londono, 19, Sydenham Hill, London S.E. 26. Estas kampara domo ne malproksime de Londona centro, kies estrino eldonis belan esp-an prospekton.

Du ŝildoj (relief- k ebena ŝildo) en kartono, kun surskribo "Esperanto — lingvo internacia" k verda stelo, haveblaj kontraŭ 2 b e l g o j ĉe G. Vermandere, Antverpeno, Vleminckstr. 18 (Belgio), poŝtĉeko Bruselo 169 191. Rabato al grupoj k revendistoj.

S. Rublev, Esperanto-Kurso en du partoj. Dua eldono. Eld. CK SEU, Moskvo, 1928. La unua parto — 60 pĝ., la dua — 30 pĝ. Form. 17×25 cm. Prezo 1 g. mk. resp. 0.50 g. mk.

La unua parto estas tute esp-a k aranĝita laŭ rekta metodo (por grupa studo); la dua enhavas la klarigon de l' gramatikaj reguloj; tre klare k kompreneble prilaborita estas ĉiu parto. Rapida disvendo de la unua dekmilo atestas pri la ŝatateco de tiu ĉi lernilo. B.

Amo kaj poezio, de **Jan van Schoor.** Havebla ĉe l' aŭtoro, Julius de Geyterstraat 149/1, Antverpeno (Belg.). 94 pĝ. Form. 14×19 cm. Prezo 2 belgoj.

Mi supozas, ke en ĉiuj landoj la poŝtkartvendistoj proponas al admiro k amemo de soldatoj k servistinoj poŝtkartojn, sur kiuj ia soldato kisas ian belan sinjorinon. Kaj sub tiom belaj, koloregaj bildoj, du aŭ kvar versoj lamas. Nur la uniformo ŝanĝiĝas laŭ la armeo, laŭ la lando; koloroj, sinjorino, versaĵo lamanta, estas tutmonde samaj. Mi bedaŭras devi diri, ke mi trovis en tiu libro nur poŝtkart-versaĵojn. Mi ridegas pensante, ke neŭtralaj kongresoj kontentiĝas pri tiaj "floraj" ludoj, aŭ pri "pacifistaj", same senfortaj ludoj. Mi nur memorigu la versaĵon de K-do Zausmer, legitan en la lasta n-o de "Sennacieca Revuo": B o r y s l a w, tiom simpla k potenca, por montri ke en SAT aperas pli bonaj, riĉaj k viglaj kreaĵoj, ol inter neŭtralularo. Ĉu mi surprizos vin, s-ro Jan van Ŝor, dirante ke, en la "Verdkata Testamento" (mi volas preni neŭtralulan verkon), estas pli da amo k da poezio, ol en via "Amo kaj Poezio"? Ĉar kvankam s-ro Ŝvarc ĉiam finas versaĵon per vortludo aŭ alia malspritaĵo, li ofte enmetas iom da vera vivo en iun fragmenton, novan eltrovon en iun verson. — Nur kelkaj ritmoj, kelkaj senrimaj versoj kvazaŭ sukcesus en "A m o k a j p o e z i o", se ideoj ilin subtenus. Ĉu tiuj versoj, eble, ne estas tradukoj de la malpli bonaj erotikaj versoj el malpli bona danda literaturo de malpli bona epoko?

Jief.

Für einen Weltbund der Jugend (Por mondjunulara ligo). Eld. Lothar Schmidt, Frankfurt a. M. Prospekto por libro samtitola germanlingva. Tiu ĉi nova ligo estis tre vigla dum la lasta jaro k uzis por siaj intern. rilatoj esp-on.

Die Epoche Liaptscheff (La epoko Liapĉef). Eldonata "Weltjugendliga-Verlag", Berlin S. W. 11. 24-paĝa broŝuro revuforma (en germ. lingvo) pri la evoluo de l' bulgara faŝismo.

Was wollen die Anarchisten (Kion volas la anarkistoj). Eld. Grupo "Freie Jugend", Gross-Berlin. Adr.: E. Jaehner, Lietzmannstr. 6, Berlin N. O. 43. Germanlingva broŝ. 16 pĝ. kun cirkulero de l' eld. en esp-o.

Dr. R. Blochmann, Kalendarreformo kun fikso de pasko. Eld. Volkswohl-Verl., Kiel, Lornsenstr. 24. En germ. lingvo. Prezo 2 g. mk. Ĉiuj detaloj en esp-o per la eldonantoj.

——«o»——

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

MOPR-gaz., Ivanovo-Voznes., n-o 4, sept., Du horoj el mia vivo (193), Jugosl. turmentejoj (194); Volksztg. (Popolgaz.), Mainz, Wiesbaden, Worms, 6. 8., 7. 8., Sit. de lab. en Usono (Detroit), Dimanĉa Lab-isto, London, 9. 9., resumo de art. pri Krimiĉaŭ, sen mencio de l' fonto!). Signalen, Stokholmo, 13. 9., El la urbo de nia 8-a (205).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Daily Herald, London, 7. 9., Folkszajtung, Varsovio (judlingva), ?, parolas ankaŭ pri SAT k kongr., Accion Cooperatista, Barcelono, 7. 9., Der Deutsche Eisenbahner, Berlin, 2. 9. (kurso), Las Noticias, Barcelona, 2. 9., 9. 9. (ĉiudim.), Daily Herald, Lond., 14. 9., 20. 9.; D. Deutsche Eisenb., Berl., 9. 9. (kurso); Accion Social Obrera, Gerona, 5. 9.; Las Noticias, Barcel., 16. 9.

Peresper. artik. k leterojn enpresis:

MOPR-gaz., Ivanovo-Voznes., sept., Neue Zeitung (Nova gaz.), München, 31. 8. (Samara), Leninec, Rostov, 30. 8., 3. 9., Molot, Rostov, 2. 9., Bolŝevistskaja Smena, Rostov, 2. 9., Krasnoje Ĉernomorije, Novorossijsk, 30. 8., Vlastj Sovetov, Stavropol, 1. 9., Krasnij Ŝaĥtjor, Ŝaĥti, 2. 9., Vlastj Truda, Vladikaŭkaz, 2. 9., Krasnoje Znamja, Taganrog, 2. 9., Krasnoje Znamja, Krasnodar, 2. 9., Groznenskij Raboĉij, Groznij, 2. 9.

Pri SAT k SAT-kongreso raportis:

Upsala, 1. 9., Arbeiderbladet, Oslo, 20. 8., Signalen, Stockholm, 6. 9., Väst-Svenska Kuriren, Göteborg, 15. 8., 18. 8., 22. 8., Ny Tid, Göteborg, 13. 8., Sjömannen (maristo), Göteborg, aŭg., Social-Demokraten, Stockholm, 20. 8. (kongr. rezolucio), Länstidningen, Östersund, 23. 8., Arbeiter-Zeitung für Schlesien, Breslaŭ, 10. 9.; Die Weltsprache, Wien, n-o 1; Bournemouth Daily Echo, 3. 9. (tre bona k detala rap. de nia K-do Stay).

Peresper. artik. enpresis:

Travail, Lyon, 15. 9.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

DISKUTEJO

Mi tre ŝatas artikolojn de K-do Krjukov kaj lin estimas. Tamen, kiam temas pri fundamentoj de nia movado — pri lingvo — necesas esti singarda pri li. 16-a paragrafo de l' Zamenhofa gramatiko diras, ke ĉiuj internaciaj vortoj konsistigas ankaŭ la vortaron de esperanto. Ni esperantistoj ĝuste fieras, ke nia lingvo enhavas la internaciiĝintajn vortojn kaj terminojn. De infanaĝo reprezentantoj de multaj eŭropaj (pri aliaj mi ne scias) nacioj diras: observatorio, redakcio, komisariato, inflacio, iluminacio, kvalifikita, revizio, emisio ktp. Kaj nia lingvo ne devas ignori kaj malakcepti tiujn formojn, kion celas K-do Krjukov. Por mi kaj certe multiuj pli facile venas en la kapon la formoj: redakcio ol redaktio, kilometro ol metromilo, procesio ol soleniro, ktp. Per mia skribaĵo mi batalas por konservo de la internaciaj formoj en vortaro preparata, por malakcepto de proponoj de K-do Krjukov. El la vortoj internacie komprenataj ni ne faru vortojn specialajn por esperantistoj. Ili restu en sia ĝenerala formo kun esperanta finaĵo. La internaciajn radikojn ni lasu resti la fundamenta reto de nia lingvo. Certe ni toleru ankaŭ la formojn proponatajn, sed ni opiniu ilin neoficialaj. (6489)

NEKROLOGO

La 25. sept. 1928 mortis, je proleta malsano, nia kara K-do

Moritz Axmann

SAT-ano n-o 6076 el Linz a. D. (Aŭstrio) en aĝo de 41 jaroj. Li estis fidelega SAT-ano k vera aktive kunlaborinta esp-isto. Honoron al lia memoro.

Aŭstria Lab. Ligo Esp-ista
Grupo Linz a. D. Pasiva 8858.

——«o»——

NIA POŜTO

357. — Vian sendaĵon ni bone ricevis. "Determ." estas destinita por "La N. E." (scienca serio). Por "L. L." ni utiligos iom post iom vian materialon. La Wünsd. artik. ne tre taŭgas.

1188. — Tre malfacile utiligebla pro sia longeco. Kiam ni bezonos felietonon, ni uzos.

8464. — Jes, kompreneble aperos via artik.

12 899. — Ni intencas uzi vian artik.

11 325. — Dankante pro denova kunlaboro, ni laŭeble utiligos viajn versojn. N. B.

Klubo

centra priservanta kelkmilon da **Moskvaj geligilistoj** (ge-PTT-istoj) kun iliaj familioj, **la klubo,** kies anoj estas geplenaĝuloj, gejunuloj, geknaboj, **la klubo,** kies larĝa kulturlaboro estas dividita je multaj sekcioj, **la klubo,** kie gastis multaj diverslandaj esperantistoj vizitintaj Moskvon, **ĝi nun alvokas Gek-dojn de l' tuta mondo** amike interkorespondi kun ĝiaj anoj ĉu kolektive, ĉu individue pri la plej div. problemoj (virinaj, viraj, gejunulaj, geknabaj, moraj, profesiaj, ekonomiaj, profunuiĝaj, politikaj, liberpensulaj, teatraj, kant-, muzik-, sport-, radio-, foto-ktp. amatoroj. Oni respondos nepre.

Se vi bezonas studi ion, la klubo helpos vin.

Se vi bezonas iujn informojn, la klubo sendos ilin al vi.

Se vi bezonas interrilati kun iu laborejo, fabriko, organizo Sovetia, la klubo peros vin.

Notu la adreson:

Moskvo. Centralnij Klub Svjazi.
Al Esperanto-sekcio.

Atentu!

Kooperativistoj - Kooperativanoj - Organizoj

Organiz-Instruktora Kolegio de "Krasnoufimska unio de agromastrum- k kredit. kooperativoj" dez. kor. kun kooperativanoj, -istoj k organizoj el ĉ. l. pri t. de kooperativa evoluo k laboro.

Skribu nur seriozaj kor-antoj! Resp. estas garantiata. Adr.: **Krasnoufimsk, Uralo, "Selkredsojuz", Org-otdel., Sovetio.**

Fervojistoj

Sendu de vialoka fervojistaro al tiu de Samara-Zlatousta fervojo salutleterojn okaze de l' Oktobra revolucio (7. 11.) laŭ adr.: USSR, **Samara,** Uralskaja 29, kv. 3, al Jeleznjakov B.

ATENTU!

K-do Teod. Tkaĉenko (maŝinserur-isto, fotoamatoro), str. Roza Luksemburg, 220, **Taganrog** (Sovetio), dez. koresp. pri lab. vivo k moraro, PI, interŝ. samtemajn fotojn kĉl. Interesaj fotoj estas uzotaj en gazetaro.

Kiu deziras havi

tute objektivan

plenan bildon pri la kultura vivo en USSR, pri literaturo, arto, teatro, kino, popolmoroj ktp. de la Sovetaj respublikoj, abonu la riĉenhavan, multilustritan revuon

"INFORMA BULTENO"

de VOKS (Tutsovetunia Societo por kulturaj interrilatoj kun eksterlando; rusa mallongigo — "VOKS").

Aperas la kvaran jaron en 3 eld.: angla-, franc- kaj germanlingva. Abonpago: 2 dol. amer. por 1 jaro, 1 dol. por ½ jaro, 0.60 dol. por ¼ jaro. Unu numero 0.10 dol.

"Informa Bulteno" de VOKS estas **la sola revuo** en germana, franca aŭ angla lingvo, kiu donas en ĉiu numero **resumon en esperanto** pri la enhavo. **Ĉiu esperantisto devas aboni la "Informan Bultenon de VOKS".**

La "Informa Bulteno" de VOKS estas precipe utila por ĵurnalistoj, sciencistoj, teatramantoj, edukistoj, kulturuloj ktp.

Postulu **senpagan specimenon** de "Informa Bulteno" de VOKS.

Abonon kaj pagojn adresu al: **Rich. Lerchner,** Colmstrasse 1, **Leipzig O 27,** Postĉekkonto n-o 6835.

Redakcio: **Moskvo,** Mal. Nikitskaja, 6, "VOKS", Presfako.

ENHAVO:

	pago
Al la direkto de morgaŭa ruĝo	9
Vojaĝaj impresoj el Suda Ameriko	10
Raportoj prezentitaj al la 1-a SAT-konferenco en Göteborg	10—11
Iom pri la kooperativa movado en Svedio	11
Plena demokratio	12
Diversaĵoj	12
Sennaciula Sporta Paĝo	13
Tra Esperantio	14—16
Anoncoj	16

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)